

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 11

N-ro 2, 1981

Edistudio, Pizo, Italujo

Internacia Pedagogia Revuo - n-ro 2, 1981

fotokompostado: Edistudio, C.P. 213, I-56100, Pisa, Italujo, Tf. +39/50/48670
presado: Offset Vallerini, Pisa, Tf. +39/50/48670

Enhavo

Kelkaj rimarkoj —

Oficiala opinio de la Bavaria Kulturministro pri Esperanto —

Hans Maiser

Rekta laboro por infanoj

a. Internacia printempa semajno 81 en Grésillon

b. Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco (Varsovio)

Leteroj, opinioj —

Statut-projekto —

Kelkaj rimarkoj

Kelkaj rimarkoj pri tiu ĉi enhavo

Kompili IPR-numeron ĉiam pli malfacilas. Neniu konsideras kunlabori, neniu skribas, neniu sendas informojn. Labori por granda ideo, realigi la noblan revon de gigantoj de la spirito kiel Zamenhof?

Zamenhof kreis Esperanton, la lingvon Internacian sed — sed jam multaj hezitas nomi sin Esperantistoj: planlingvisto aŭ IL-ano, jes. Regide kaj tamen fleksible modernistoj provas transformi Esperanton en *Karikaturon*.

Sed oni povas turni la aferon kiel oni volas- sen la grava kaj konstanta laboro de la instruistoj Esperanto ne progresus. Esperanton lernantaj infanoj garantias la disvolviĝon de Esperanto- kaj tio sur la plej vasta fronto.

Se ankaŭ la oficiala opinio pri Esperanto far de iu kulturministro diskriminacias la lingvon, li tamen ne principe kontraŭas la instruadon de Esperanto.

Legu atente la dokumenton-iom tipe rilate la lingvon. Via rekta respondo al mi estus tre valora, ĉar post traduko mi rekte sendos vian respondon al la ministro!

Ekzistas kelkaj kasteloj de la porinfana laboro:

IPR ĝojas prezenti ĉi-kajere du:

Esperanto estus iom pli malriĉa, se ne estus la eksterordinara laboro de Gresillon- vere la triopo Vincent/Benistant/Magadure komprenas kreativigi infanojn.

Tre celkonscie laboras juna Klubo kies nomo estas Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco Varsovio.

Jes, jen elkreskas granda familara rondo inter infanoj kaj junaj homoj. IPR kore gratulas kaj kun plezuro publikigas provojn.

IPR nun fine prezentas la statutprojekton kies historio jam havas atentindan evoluon. ILEI modernigis sian statuton-el la jaro 1949 kaj adiaŭis ĝin la 1-an de Aŭgu-

sto 1969 en Helsinki. La rimarkinda eco de tiu ĉi statuto estas ĝia koncizeco- 20 pa-
raĝrafoj kaj 50 subciferoj. La nova projekto enhavas en sia statuta parto 15 artikolojn
kun 93 subciferoj krome apartenas al ĝi. Ĝenerala Regularo indikanta 7 artikolojn
kun 33 subciferoj- do entute 22 artikoloj kaj 126 subciferoj.

Nun — la estraro de ILEI ne malhavis kaj ne sentis la bezonon al nova statuto
krom la fakto, ke IPR estu memkomprenebla parto de la membreco.

Alia grava punkto estas, kiel fortigi la demokratecan opinio-disvolviĝon per sub-
streko de la asembleo: vidu la proponon de la projekto!

La projekto dankas sian naskiĝon al sinjoro Une Hukstra kiu pacience kaj celo-
srebe kompilis plej diversajn opiniojn. Prezidanto kaj estraro respekte rekonas la
sindonan laboron de la sekciestro de nia fidela sekcio nederlanda kaj IPR atendas
vian viglan eĥon.

Tamen, la plej brila statuto neniam kaj neniel kapablas anstataŭi nian seriozan la-
boron — kaj ĝi faciligu sed ne lamigu la laboron de la estraro!

Tibor Sekelj

MONDO DE TRAVIVAĴOJ

La senpaŭza vivo de la fama esploristo
en tridek rakontoj verkitaj en la
kutima atentokapta stilo de Sekelj.

21 cm, 288 paĝoj + 24 fotoj de la aŭtoro, 24 nl. gld.
(+ 10% sendokostoj; 1/3 rabato por mendoj de minimume 3 ekz-oj).

EDISTUĴDIO — C.P. 213 — I-56100 PISA — ITALUJO

Oficiala opinio de la Bavaria Kulturministro pri Esperanto

Bavaria Parlamento
9-a elektoperiodo

Presajo 9/6006

Skriba demando
Koncernas: Esperanton

Laŭdire Esperanto akiras mondscale ĉiamplici da amikoj.
Eĉ en UN estas strebadoj gajni multe pli da influo por tiu ĉi artolingvo.
Mi demandas la ŝtatregistaron:

Kiun lokon ĝi almezuras al tiu ĉi lingvo?
Kiom amplekse Esperanto estas oferita en bavaria
plenkreskulaj-kaj pli pluklerigaj aranĝoj?
En kiuj lernejoj de Bavario kaj kia-kiomplekse
Esperanto-kursoj estas prezentitaj?
Kiujn eblecojn vidas la ŝtatregistaro konsenti al
Esperanto kiel elektofakon?

Munkeno, la 20-an de Majo 1980
Jakobi
m.d.p./F.D.P.

Al la
sinjoro prezidanto
de la Bavaria Parlamento

Munkeno

Skriba demando de la deputito Jakobi de la 20-a de Majo 1980 koncerne Esperanton.

I etero de la 23-a de Majo 1980.

Tre estimata sinjoro prezidanto!

La skribajn demandojn, de la s-ro deputito Jacobi, kiu ilin detaligis en kvar punktoj, mi respondas jene:

Je punktoj 1 kaj 3:

Esperanto ne estas mondlingvo en la senco, ke ĝi estas facile lernebla de parolantoj de la diversaj kreskintaj lingvoj en la mondo.

La arto-lingvo Esperanto estas kreita de d-ro Ludwig Zamenhof nur sur la bazo de la indoĝermanaj lingvoj, do ĝi ne donas lernhelpojn por parolantoj de neindoĝermanaj lingvoj kiel por Finnoj kaj Hungaroj en Eŭropo aŭ por Azianoj kio koncernas gramatikon kaj vorttrezoron.

Se Esperanto unuflanke nur por parolantoj de indoĝermanaj lingvoj estas pli facile lernebla kaj aliflanke por aliaj nur ĉirkaŭvoje, lernantaj iun indoĝermanan lingvon, kaj krome eĉ ne sukcesis disvastigi kiel eble Angla lingvo — gepatra lingvo de pli ol 300 milionoj da homoj: Britaj Insuloj, Usono, Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando, Sudafriko, sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, uzata tie kiel dua lingvo por tiel ebligi kompreniĝon inter heterogenaj lingvoj, evidente Esperanto por tiu ĉi vidpunkto ne povas anstataŭi kreskintan mondlingvon.

Ankoraŭ pli malpli Esperanto kapablas anstataŭi modernan lingvon entenatan en lernejoj horarplanĵoj, ĝi ne posedas la klerigfaktoron, ĉar ĝi estas koncipita kiel “neŭtrala komprenilo” al kiu laŭnature mankas ĉiuj emociaj kaj spiritaĵoj de la kreskintaj gepatraj lingvoj. Jen tre draste evidentiĝas la limoj de Esperanto kiel instrulingvo en la kadro de la lernejoj. Sendube ili ja havas apud la lingvoinstruado kaj komunikila tasko ankaŭ aliajn klerigan celojn: ili estas tiaj kulturaj valoroj kiaj ili speguliĝas en la idiomo de limigita lingva regiono, kaj el ĝi kreskinta literaturo. Pli malvastan kaj pli specialan celon povas meti al si la okupo pri fremdlingvo en la formo de libervola laborgrupo ol la instruado de devigaj fremdaj lingvoj.

La faktoj eksplikas kial ne kulturministroj de la landoj en la Federacia Respubliko de Germanio povis devigi Esperanton al la gelernantoj, kvankam ili havis komprenemon por Esperanto en libervolaj laborgrupoj, en kiuj interesatoj povos studi la rezulton de eksperimento per racionaligita arto-lingvo akcepti la kompreniĝon inter la popoloj.

Bavario prientenas la decidon de la kulturministro-konferenco de 4/5. Novembro 1954 kiu tekstas:

La enkonduko de Esperanto kiel deviga fako estas refuzita. Kontraŭ la instruado

de Esperanto en libervolaj laborgrupoj ne ekzistas skrupuloj.

La ŝtatministerio ne konsideras pro pedagogiaj kaj lernejo-organizaj kaŭzoj ŝanĝi la nunan decidon.

Kiel jam eksplikite la ministro opinias pli grave, konsiderante la klerigkomision, la okupon pri kreskintaj fremdlingvoj ol la okupadon pri artolingvo kiel Ido. Vola-puk, Novial, kaj ankaŭ Esperanto, kiuj ĉiuj — severe rigardataj — estas nur helpiloj de interkompreniĝo.

La aldona enkonduko de Esperanto kiel deviga lingvo signifus por la gelernantoj tropostulon. Krome signifus la enkonduko de Esperanto kiel deviga lingvo (en Bavario) la disrompigon de la relativa unueco de la germana lerneja sistemo kaj kontraŭ la interkonsento inter la landoj de la Federacia Respubliko de Germanio por unuecigi la lernejan sistemon (Hamburga interkonsento).

Je punkto 2:

...

Je punkto 4:

En la interkonsento inter la Landoj de Federacia Respubliko pri unuecigo sur la kampo de la lerneja sistemo (Hamburga Interkonsento) § 9 estas paragrafita, ke en la “ĉeflernejo” (lernejo tipo en Germanio, en kiu estas gelernantoj nek vizitantaj gimnaziojn nek mezgradan lernejon sed ankoraŭ lerndevigataj — rim. de la tradukanto) estu unu fremdlingvo instruata regule la Angla lingvo.

La prezentado de plua fremdlingvo tial ne eblas en la kadro de la multflankaj taskoj de la ĉeflernejo, speciale la alkondukado al profesioj kaj laboraj medioj.

Krome la limigita, disponebla instrutempo malebligas la enkondukon de dua fremdlingvo kaj ankaŭ estus pro la troa ŝarĝo ne respondebla.

En la elektfaka katalogo de la mezgrada lernejo kaj ekonomia lernejo Esperanto ne estas entenata kaj oni ne intencas pli ampleksigi ĝin.

En la kadro de la specialaj faklernejoj nek en la devigaj nek en elektliberaj fakoj estas spaco por Esperanto. La plibonigo de la lingva kompetenteco de la gelernantoj koncentras sin sur la gepatran lingvon.

Krom la aranĝo de liberaj laborgrupoj Esperanto en gimnazioj povas esti elektata en supera ŝtupo senĝene kiel baza kursfako kondiĉe estas sufiĉe da interesatoj. En la kadro de la aldona programo por la jaroŝtupoj 12/13 Esperanto estas frekventita 3 horoj.

Bazaj kursoj pri Esperanto povas esti aranĝataj, se la kursgvidanto antaŭmetos al la lernejestro instruplanskizon kaj je kursfino koncizan raporton pri la fakta sinsekvo.

Eventuale estas malfaciloj pretigi taŭgajn instruistojn. Propra instrukapableco en la kadro de scienca kaj pedagogia ekzameno por la instruofico en gimnazioj ĉiukaze ne estas intencata.

Tio ĉi povus esti pro la atendata negranda amplekso de la intereso pri la instruado en tiu ĉi arto-lingvo kaj enperspektive pozitiva bazo de fakkunligoj kun Esperanto por posta dungado ne favora.

Kun eksterordinara altestimo


Hans Maier

Ŝtatministro

Helmut Sonnabend

Esperanto: lerneja eksperimento

- raporto
- analizo
- konkludo



157 paĝoj
sciencnivele
prilaboritaj
flulegeblaj
kaj kaptaj
kiel romano

12 gld. 5000 lit.

Edistudio, 1981

c.p. 213 I-56100 Pisa — tf. + 39/50/48670

Rekta laboro por infanoj

a. Internacia printempa semajno 81 en Grésillon

I. Infanrenkonto.

Kvardeko da geknaboj, francaj kaj anglaj, kaj dudeko da plenkreskuloj alportis viglan vivon en la kastelon dum unu semajno. Matene funkciis tri kursoj sub la gvidado de S-ino Hartridge, S-roj BENISTANT kaj LE MAGADURE. Posttagmeze okazis promenadoj, sportaj turniroj, ekskurso al Le Mans.

Ĉijare, la gvidantoj proponis al la infanoj, ke ili preparu marionetojn kaj skeĉetojn por paroligi ilin. La propono estis bone akceptita kaj kelkaj infanoj vere lerte kaj rapide kreis siajn pupetojn, eltrovis rakontojn kaj preparis la dialogojn kun la helpo de plenkreskuloj por la esperantigo. Aliaj preparis la dekorojn, starigis la scenojn. La prezentado okazis vendrede vespere. La programon kompletigis muzikeroj luditaj de junaj gitaristoj kaj flutistoj. La du fotistoj, Yannick kaj Henri, ege plezurigis ĉiujn, dank'al iliaj lumbildoj pri la jusaj okazintaĵoj.

kiel kutime, la infanoj verkis tekstojn kaj desegnis, plenkreskuloj helpis gravuri kaj tajpi stencilojn, la junaj partoprenantoj mem zorgis pri la multobligado. Sabate vespere, post streĉa laboro, la libretoj estis pretaj; ili estis disdonitaj je la fino de la lasta vesperkunveno.

Bonhumoro, kunlaboro, familia ĉtoso regis dum la tuta semajno.

II. Pedagogia seminario.

Samtempe, cele al formado de taŭgaj esperanto-instruantoj, disvolvigis seminario pri pedagogio de la lingvoinstruado, sub la gvidado de S-ino J. VINCENT.

Ĝi konsistis el du partoj: en la tri unuaj tagoj, teoria prezentado: 1. Kio estas pedagogio? 2. La atento: kiel ĝin teni? 3. La memoro: kiel ĝin eduki? Post ĉiu prelego okazis debato. En la tri lastaj tagoj, la seminarianoj aŭskultis laŭvice la tri diversnivelaĵajn kursojn kaj debatis kun la respektivaj gvidantoj pri ilia maniero instrui. Unu seminario prove gvidis unuhoran lecionon al unuagrada kursanoj. Tuj poste okazis debato inter li, la kursgvidanto kaj la seminarianoj.

La konkludo estis tute pozitiva. La junulo bone kaj taŭge aplikis la lernitaĵojn, klopodis meti sin je la nivelo de la infanoj kaj teni ilian atenton ĝis la fino. Kvan- kam nur sep homoj aliĝis al tiu seminario, ĝia rezulto estas tre kuraĝiga. Nepre par- toprenu tian aranĝon. Eble dank' al tio, ni havus pli multe da spertaj kursgvidantoj.

J. VINCENT.

J. BENISTANT.

F LE MAGADURE



III. Internacia Printempa Semajno 1981 en Grésillon.

La unuan matenon, S-roj BENISTANT kaj LE MAGADURE (kasisto kaj prezi- danto de G.E.E., la franca sekcio de ILEI) zorgis pri la dispartigo de la infanoj en 3 kursojn.

Ĉasisto, kiu nenion trafis dum la ĉasado, subite troviĝas antaŭ multkolora kunik- lo. Li diras al si:

“Jen stranga kuniklo! Mi pafu al ĝi, se ne, neniu volos kredi min.”

La kuniklo sin direktas al arbareto. La ĉasisto pafas, kaj tuj aŭdas kriojn:

“Panjo! Panjo!”

Estis la voĉo de bebo promenanta kun sia pluŝa kuniklo.

Frank Thomas, 10 jara knabo.



En la kurso de S-ino HARTRIDGE multaj gelernantoj deziris skribi.

En la bazaro de Baugé, mi aĉetis revolveron. Sinjoro Le Magadure vidis ĝin sur mia lito, kaj li diris:

— Ĉu vi aĉetis revolveron por mortigi la fantomojn de la kastelo?

— Jes, ĉar mi aŭdis fantomojn. Mi jam mortigis unu.

Christophe Giry

10-jara knabo

Merkredon, post la tagmanĝo, ni iris piede al Saint-Martin d'Arcé. Ni vizitis la ludejon “Boule de Fort”, en kiu oni ludas per platgloboj. Maljuna sinjoro montris al ni, kiel oni ludas. Li bone ludas. Per malrapidaj gestoj li ĵetas la platglobon, kiu malrapide kaj zigzage iras ĝis blanka globeto. La ludejo estas el tero tre glata kaj oni ne rajtas marŝi sur ĝi.

Ĉiusemajne oni prizorgas la ludejon: oni akvumas kaj glatigas ĝin.

Sabate kaj dimanĉe, vilaĝanoj venas ludi, aliaj venas rigardi. Apud la ludejo estas trinkejo.

Erwan Guillermo

kaj Oliver Beduz

10-jaraj knaboj

EN LA ARBARO
DE GRESILLON
LA BIRDOJ BABILAS
EN ESPERANTO.

Christophe Paul.
10 jara knabo.

Hieraŭ ni iris al Le Mans. Ni foriris je la dua horo. Ni iris per aŭtobuso. Unue, ni vizitis la rondirejon "24 horoj de Les Mans". Du rapidaj motorcikloj faris provojn. Poste mi iris vidi la aŭtomobilo muzeon. Estas malnovaj kaj malmodernaj veturiloj kaj kelkaj pli modernaj. Estas ankaŭ novaj kaj malnovaj bicikloj. Ni vidis ankaŭ la veturilon de Hitler. La muzeogardisto povas rigardi la tutan ĉambregon per televidiloj. Poste, ni rigardis kaj vizitis la malnovan parton de Le Mans. Ni vidis multajn malnovajn domojn. Nun, kelkaj el ili estas renovigitaj. Ni vidis ankaŭ la gallo-romianajn remparojn. Poste, ni iris al la kastelo Le Lude, kie somere okazas spektaklo sur la rivero kaj apude. Poste, ni revenis al Grésillon je la sepa horo.

Marylène Le Roux

LUDU! (Michèle Boulin kaj Françoise Rousel.)

1. Ĝi pasas tro rapide.
2. Inverse, ĝi donas plantidon.
3. Estas en la ĉielo, kiam la ĉetera estas griza.
4. La komenco de vilaĝo.
5. Ilo de ĝardenisto kaj de fosisto.

- A. Tion oni ne volas pagi.
- B. Ofte infanoj... en kurso.
(verbo je infinitivo plus vokalo.)
- C. Oni bezonas ĝin en ĉiuj ĉambroj de la domo.
- D. Indikas kaŭzon de ago.
- E. Mezo de "DOGO".
Ripete, sama kvanto al ĉiu.

	A	B	C	D	E
1					
2					
3					■
4				■	
5					

	A	B	C	D	E	F
1						
2						■
3				■		
4						
5				■		
6						■

1. Loko, kie vivas libere sovaĝaj bestoj.
 2. Panjoj devas fari tion pro siaj beboj.
(infinitivo).
 3. Komenco de "EMIRO".
 4. HELENA en malordo.
 5. Persona pronomo.
 6. Por eliri en la domon, oni devas transpasi ĝin. (en malordo).
- A. Bestoj tre obstinaj.
 - B. Loĝanto de Romo.
 - C. En somero, la suno ofte...
(verbo je pasinteco)
 - D. Komenco de "AGRABLA"
 - E. Nesala vivejo de la fiŝoj.
 - F. Franca interjekcio.

IV. Vendreda Vespero.

Prezentas: Sylvain. — Laurent resumas la antaŭan.

- 1° *Pup teatraĵoj.* (La infanoj mem fabrikis siajn pupetojn kaj verkis la tekstojn.)
— "La kverelo" (Nathalie Boulin, Lynda Guillermo, Catherine Gilbert).
— "La pirato kaj la sorĉistino sur insulo" (Oliver Bédúz Erwan Guillermo kaj Christophe Paul.)
— "La miraklo de Baugé" (Fabienne Le Guellec, Nadia Cerisier, Deborah Robin, Caroline Sylvestre, Franck Tomas, Bérangère Verdun, Sylvie Martin.)

Dua. 1, arbaro. 2, zorgi. 3 emi, vo. 4, naleh. 5, oni, re. 6, josto.
A, azenoj. B, romano. C, brilis. D, ag. E, rivero F, ohe.

Solvaj: Unua. 1, tempo. 2, onerg. 3, nuboj. 4, vil. p. 5, plioĉo.
A, tonvp. B, enui, i. C, meblo. D, pro. E, og, po.

Muta prezentado: "La skulptisto ka la statuo" (Christophe Giry kaj Erwan Le Guyader.)

2° *Muzikado.*

- Nathalie kaj Lynda ludis du pecojn per fluto.
- Yannick kaj Michèle ludis kvar pecojn per gitaro.
- Pascal ludis tri pecojn per bekfluto.

3° *Lumbildoj* kaj esperantigita akompana teksto "La kristnaska festo de Fabricio" (Jacques Paul kaj liaj lernantoj el Plemet).

4° *Lumbildoj* pri Grèsillon 1981.

Patrice Le Lan kaj Françoise Corre desegnis la dekorojn.

b. Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco (Varsovio)

Beatrice Fairbank — Paris, FRANCIO **membrnumero 149**

Karaj geamikoj,

Mi tre dankas vin pro la bultenoj, kiujn vi sendis al mi. Mi multe ŝatas ricevi novaĵojn el ĉiuj mondpartoj. Mi estas preskaŭ 13-jara knabino. Mi loĝas en Parizo, la ĉefurbo de Francio. (52.700.000 loĝantoj en Francio, 8.200.000 loĝantoj en Pariza regiono).

Nun estas vintro kaj la suno ne ofte brilas! Ĉiuj infanoj ŝatas neĝon por elfari neĝulojn, sed en Parizo tio estas malofta!

Hodiaŭ ni festas epifanion. Tiun tagon ni manĝas specialan platkukon, kiu enhavas la t.n. "fabon", fakte ŝtoneton el porcelano aŭ plastiko. Ĝi havas figuron (bebo, suno, luno, krono.. k.a.)

Tiu, kiu trovas la ŝtoneton en sia peco, estas nomata "la reĝo" (aŭ la reĝino). Li elektas la "reĝinon" (aŭ ŝi elektas reĝon). Oni kronas lin per ora paperkrono (Mi ĉi-aldonas fragmenton de tia krono). Oni krias "Vivu la reĝo, vivu la reĝino!". La infanoj tre ŝatas tiun kutimon!

Jes, mi deziras esti membro de via klubo. Mi rimarkis viajn angul-tranĉitajn kovertojn — tio estas tre nekutima por mi, kaj precipe mi tre ŝatis la polajn poŝmarkojn (mi kolektas).

Mi salutas la tutan klubon

Beatrice

Kara Beatrice! Ni tre dankas pro via interesa letero, bela bildkarto kaj la parto de ora krono. La priskribo de la kutimo vere interesis nin. Ni tre ĝojas, ke vi aliĝis al la klubo. La angulojn de la kovertoj ni detranĉas por sendi niajn grupleterojn kiel pre-

saĵojn (tiam sendokostoj estas pli malgrandaj). Ni tutkore salutas vin kaj ni antendas nekstajn novaĵojn de vi!

KASTORA KLUBO

Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco

Junulara Kulturdomo ul. Deotymy 37 01-441 Warszawa

La 2-a kluba tasko! Atentu ĉiuj geklubanoj!

(Ankaŭ por Amikoj de la Klubo)

Ni ĉiuj helpu al niaj peruaj geamikoj!

Ĉiu klubano sendu al nia perua amiko bildkarton kun salut-vortoj, por ke li povu montri al siaj samlandanoj, ke Esperanto fakte estas uzata en la mondo.

Jen la adreso de nia Amiko:

Cesar Abad Castaneda

Jose Baquijano 629

PJ Diego Ferrè

Chiclayo

Peru

Boothville Middle School, BRITIO

Karaj Amikoj,

Nia lernejo nomiĝas Boothville. Ĝi estas mezlernejo, t.e. kun geknaboj 9-13 jaraj. Ĝi malfermiĝis en 1971. Oni lernas la anglan lingvon, matematikon, sciencon, la francan lingvon, historion kaj geografion, muzikon, artformojn kaj sportojn.

Estas ĉirkaŭ 520 lernantoj en 17 klasoj. Estas 23 instruistoj. La lerneja tago komenciĝas je la 9-a matene kaj daŭras ĝis tagmezo. La plimulto da infanoj tagmanĝas en la lernejo kaj oni reen-iras la klasojn je la 1-a 15 ĝis la 3-a 45.

Ests multaj kluboj post la klashoroj kaj dum la lunĉhoru. Ekzemple muzika, ŝaka, sporta, fotografia k.t.p.

Amike

Nina Soloff, Rachel Williams, Jane Morris,

Tim Almond, kaj ilia instruisto

Stephen Thompson

Karaj geamikoj! Ni tre dankas pro via interesa letero. Kun scivolemo ni tralegis, ke en via lando lernejo por geknaboj 9-13 jaraj nomiĝas mezlernejo (aŭ vi eble erare skribis?), ĉar en nia lando estas alie — elementajn (bazajn) lernejojn vizitas 7-14 jaraj geknaboj, do estas ok-klasa lernejo. Ĉu vi ankaŭ lernas Esperanton? Ĉu vi ali-

ĝos al nia klubo kaj ĉu via instruisto akceptos la titolon Amiko de la Klubo? Ni tutkore salutas vin ĉiujn!!!

Mia urbo — Livorno

La urbo, kie mi loĝas nomiĝas Livorno, kiu estas sufiĉe granda, ĉar havas ĉirkaŭ 177000 loĝantojn; ĝi situas laŭlonge la Ligura-Tirena marbordo kaj je la piedoj de Pisaj kaj Livornaj montetoj.

Ĝiaj originoj estas necertaj — la primitiva vilaĝo frumezepoka nomiĝis el Liburni tribo aŭ el natura kajo de sveltaj Liburnaj ŝipoj. En XII jarcento ĝi estis donita al Pisa de grafino Matilde. En XIV jarcento la paco de Lucca ĝin liveris al Genova, kiu en XV jarcento ĝin transdonis al Firenze. La 28-an de marto 1577-a Medici fondis la “idealan urbon”, sekvante la projekton pentagonan de Buontalenti. La urbo, ĉefverko de Medici familio disvolviĝis superabunde kaj impone ankaŭ sub Lorena familio (Leopoldo II fakte, oni diris, la dua fondinto de Livorno). Stratoj, placoj, preĝejoj, teatroj, publikaj fondaĵoj, pontoj, akvo-kondukiloj, fervojoj estas el tiu ĉi epoko.

Nunĉ Livorno estas urbo ankoraŭ en kreskanta disvolviĝo kun novaj kaj modernaj konstruaĵoj, kiuj ekstaras anstataŭ la konstruaĵoj detruitaj de la lastaj militaj eventoj, kun elegantaj magazenoj, allogaj klubejoj kaj... kelkaj timemaj ĉielskrapantoj; sed tio, kio karakterizas nian urbon, estas la monumento al la “Kvar nigrujoj”, kiu situas apud la malnova fortikaĵo (skulptisto Pietro Tacca). Livorno havas komercan, industrian kaj turisman havenon, havas gravan sifarejon kaj famkongan ŝipan akademion. Ankaŭ kiel bona kaj restada centro ĝi havas la plej famajn tradiciojn. Tie ĉi oni manĝas bongustan fiŝsupon kaj bongustegajn triĝlojn, livornane.

Fine multaj famegaj homoj, inter kiuj pentristoj — Fattori, Modigliani; verkisto — Guerrazzi, poeto-Marradi kaj muzikkomponisto — Mascagni naskiĝis en nia simpatia, mara urbo.

Amiko de la Klubo S-ro G. Frimannsson, Akureyri, ISLANDO

Karaj amikoj

Kore mi dankas al vi pro viaj leteroj de via klubo. Tre plaĉas al mi viaj legendoj pri mara virino (sireno) kaj ĉi tie estas unu el mia lando — Islando.

Islanda legendo pri sireno

La foka felo

Antaŭ multaj jaroj vivis iu homo ĉe la marbordo ie sude en Islando. Iufoje li iris al la marbordo frue matene antaŭ ol aliaj homoj ellitiĝis. Li venis al iu roko kaj trovis tie grotan pordon. Tie interne li aŭdis bruegon de dancantaj homoj, kiuj estis tre ĝajaj. Ekster la pordo li trovis multajn felojn. Li prenis unu el ili kaj kiam li revenis

hejmen, li metis la fokan felon en la keston, ŝlosis ĝin kaj kaŝis la ŝlosilon en unu el siaj poŝoj.

Poste li iris ree al la grota pordo. Tie sidis juna kaj bela virino. Ŝi estis tute nuda kaj multe ploris. Estis ŝia la foka felo, kiun la viro prenis hejmen kaj kaŝis ĝin en la keston. La viro donis al ŝi vestojn kaj iris kun ŝi hejmen. Post nelonge ili geedziĝis kaj havis infanojn. La virino ofte sidis sur la roko kaj rigardis al la maro. La foka felo ĉiam estis ŝlosita en la kesto.

Multaj jaroj poste la viro iris al la maro por fiŝkapti. Iam li forgesis la ŝlosilon de sube de lia kapkuseno. Kiam li revenis hejmen — li ekvidis sian keston malŝlositan kaj lia edzino malaperis kun la foka felo.

Ŝi ne povis rezigni la tenton, kiam ŝi ekvidis la fokan felon, kaj surmetis ĝin. Poste ŝi saltis en la maron kaj murmuris al si mem:

Mi timas mian faron

sep infanojn mi havas en la maro

kaj sep infanojn en lando.

La viro estiĝis tre malĝaja. Kiam li fiŝkaptis, ofte iu foko vagadis ĉirkaŭ lia boato kaj ŝajnis, ke larmoj estis en ĝiaj okuloj. De tiam la viro estiĝis tre bonŝanca en sia fiŝkaptado kaj diversaj objektoj albordiĝis ĉe li. Ofte oni vidis kiam liaj infanoj promenadis sur la marbordo, ke la foko naĝis proksime al ili en la maro. Ĝi jetadis diverskolorajn fiŝojn al ili. Sed neniam ilia patrino revenis al la seka lando.

rakontis
Małgosia Zorawska

(Estimata Sinjoro! Ni tutkore dankas pro tre interesa legendo, kiu, ni esperas, tre plaĉos al niaj geamikoj, same kiel ĝi plaĉas al ni. Ni kore salutas vin, kaj ni petas, ke vi transdonu nian saluton al ĉiuj islandaj esperantistoj, kun kiuj vi havas kontakton.)

Leteroj, opinioj

Lernejo: SCUOLA ELEMENTARE CEP
Via Flavio Gioia — Pirri
I-09100 CAGLIARI (Sardio) — Italio

Instruisto: (sinjoro) Nino Pala
Via del Mirto 7, tel. 070/502676
I-09100 CAGLIARI (Sardio) — Italio

Aldono n-ro 1 al la Kaljaro, 21/12/1980
RAPORTO PRI LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN ITALAN ELEMEN-
TAN LERNEJON (de la 10-a de junio 1980)

1980 — Oktobro. La kvar eksterlernejaj kursoj jam funkciantaj dum la lasta lernjaro (Fizika Edukado, Angla Lingvo, Esperanto, Teatra Animado) estas konfirmitaj por la lernjaro 1980-81. La kurso de Esperanto rekomenciĝis jam en la monato oktobro. Vizitadas ĝin ĉ. 150 geknaboj, dividitaj, kiel lastjare en 6 grupojn.

Do, ankaŭ ĉijare funkcias en nia lernejo du paralelaj lingvaj kursoj: Angla Lingvo kaj Esperanto, ĉiu kun proksime la sama nombro da lernantoj.

La novaĵo rilate al la lastjara organizado estas jena: la infanoj de la unuaj klasoj (6-jaraj) ne vizitadas la lingvajn kursojn, sed ili vizitadas la kurson pri fizika edukado.

La du lingvajn kursojn la infanoj vizitadas ekde sia dua lernejarlo.

Tial, la infanoj, kiuj vizitadas la kurson de Esperanto, lernas la lingvon dum tri sinsekvaj jaroj, kaj tio koincidas kun alia vizitado de la dua, la tria kaj la kvara klaso. Sekve, ĉiujare, du klasoj (el la ses kiujn la instruisto prizorgas) ĉesos vizitadi la kurson (post trijara lernado) kaj du novaj klasoj komenco ĝin.

Je la fino de oktobro, ni havis la plezuron ricevi la viziton de du karaj geamikoj el Germanio: gesinjoroj Margret kaj Willi Brandenburg (s-ino Margret Brandenburg redaktas la paĝon por la infanoj en la revuo "Monato"). La gastoj dediĉis tutan

matenon al niaj gelernantoj kaj ilia vizito estis ĝojiga evento kaj tre efika sperto por ni ĉiuj.

1980 — Decembro. En la unuaj tagoj de decembro, alia ŝatata gasto vizitis nian lernejon. Temas pri s-ino Saĉiko Nakamura kiu, alveninte en Eŭropo kun grupo da japanaj gekolegoj, lasis kelkajn tagojn sian grupon en Parizo por veni ankaŭ al Sardio kaj viziti nian lernejon. La simpatia gastino restadis en nia urbo tri tagojn kaj dediĉis la tutan tempon al niaj gelernantoj kaj al la lokaj plenaĝulaj esperantistoj. Ŝia ĉeesto inter ni forte impresis niajn infanojn.

Hungara Esperanto-Grupo el la urbo Szombathely kontaktis nin kaj proponis interesan programon, kiun la loka grupo baldaŭ pridiskutos. Pluraj el niaj infanoj jam ricevis leteretojn el hungaraj samaĝuloj kaj ankaŭ ili baldaŭ respondos.

Kiu deziras kontakti nin, bonvolu skribi al nia lerneja adreso, se temas pri infana interkorespondado.

Pri ĉio alia, bonvolu adresi jene: ESPERANTO-GRUPO
ĉe f-ino Maria Murgioni
Via Guglielmo Pepe 19, Pirri
I-09100 CAGLIARI (Sardio) — Italio

Kiu deziras ricevi kopion de la supre menciita raporto, bonvolu skribi al
SARDA ESPERANTISTA UNUIĜO
Via Umberto I, n-ro 60
I-07014 OZIERI (Sassari) — Italio

Madrido la 9an de Marto de 1981

Karaj geamikoj:

Mi skribas al vi por komuniki la organizadon de la 111a Internacia Literatura Konkurso de Madrida Esperanto Liceo, kaj petante, se eblas, la diskonigadon en via medio, de ĝi.

Jen la regularo:

1. Estos kvar branĉoj, unu premio po branĉo, kiuj estos
 - a) Prozo, originala en Esperanto, minimume 2.000 vortoj.
 - b) Poezio, originala en Esperanto.
 - c) Eseo, libera temo, originala en Esperanto.
 - d) Traduko el hispana proza Verkajo al Esperanto, minimume 2.000 vortoj
2. La limdato por akcepto de konkursaĵoj estos la 1-an de Oktobro de 1981, en mano aŭ la poŝta stampilo.
3. Oni sendos la originalon kaj kvar kopiojn, tajpitajn sur papero DIN-A4, kun la pseŭdonimo de la aŭtoro.
4. En fermita koverto estos skribita ekstere la pseŭdonimo kaj interne la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro.
5. La gajnintoj estos informitaj almenaŭ unu semajnon antaŭ la disdonado de premioj, por favoriĝi la ĉeeston de ili.

6. La oficiala solena disdonado de premioj okazos dimanĉon la sesan de Decembro de 1981.
7. La juĝistaro disdonas la premiojn. Se estas egaleco, decidus la voĉo de la prezidanto.
8. La aranĝantoj de la Konkurso (Madrida Esperanto Liceo) havas la rajton eldoni la premiitajn verkojn. Se tiuj verkoj ne estas publikigitaj dumunu jaro, la verkisto mem povos publikigi ĝin fari. La ne premiitaj verkoj povos esti repetaĵoj de la verkistoj ĝis la 8-an de Januaro de 1982.
9. Oni sendus la konkursaĵojn al

MADRIDA ESPERANTO LICEO
(por la Literatura Konkurso)
c/Atocha 98,4°
MADRIDO-12
HISPANIO

Dankon kaj korajn salutojn:

Augusto Casquero de la Cruz
Prezidanto de M.E.L.

La redaktoro de
Internacia Pedagogia Revuo,
In den Horstwiesen 42,
D-3150 Peine,
FRG.

Estimata redaktoro,

Kun granda intereso mi legis la raporton en IPR 3/1980, pri la metodika kaj didaktika servo de ILEI. Gratulojn al la partoprenintoj pro la grava laboro farita. La listigo de instruiloj estas aparte utila, kaj la proponoj al ILEI pri taskoj farendaj montras praktikan sintenon de spertuloj.

Mi miris, tamen, ke la libro de Babin, 'Por la Praktikantoj', troviĝas inter tiuj iloj por instruado laŭ la 'nerekta metodo'. 'Por la Praktikantoj' estas, fakte, verkita por instruado laŭ la rekta metodo, kaj mi rekomendas ĝian uzon por gvidado de daŭrigaj kursoj, post kursoj gviditaj laŭ mia rektmetoda materialo, 'Baza Kurso en Esperanto', (kiun, mi bedaŭre rimarkis, estas ne inkludita en la listo!). Ĉe Grésillon, dum la dua periodo de la someraj taĝoj, la kursoj por komencantoj estas gvidataj laŭ mia kursmaterialo, kaj la kursoj por progresantoj, laŭ la libro de Pierre Babin. La solaj kursoj ne-rektmetodaj ĉe Grésillon en tiu periodo, estas la kursoj por franc-lingvanoj, kiuj celas specialan ekzamenon. Por via eventuala intereso, mi sendas ĉi-kune informilon pri mia kurso.

Kvankam mi ne nun instruas Esperanton en lernejoj, mi ankoraŭ foje instruas la lingvon al infanoj. Tial mi anticipu jam ĝuas legi pli pri la aktivaj de la metodika kaj didaktika servo de ILEI rilate al porinfana instrumaterialo.

Ĉian sukceson en via laboro por Esperanto deziras pro vi kaj ĉiuj viaj kunlaborantoj,
kore via,

Audrey C.E. Childs-Mee

La redaktoro,
Internacia Pedagogia Revuo,
F.R. Germanio.

Estimata Rektoro Sonnabend,

Kun intereso mi legis la artikolon, (IPR, n-ro 3, 1980), "Grava Propono de la 4-a Studgrupo..." sed, (eĉ prenante en konsideron la ĝenajn pres- kaj aliajn-erarojn), mi neniel povas deĉifri, kio estas efektive tiu grava propono. Troviĝas tiom da proponoj, ĉiuj en sia propra rilato gravaj, ke ne eblas, por mi, malkovri la gravan proponon al kiu la donita titolo rilatas.

Ŝajnas al mi, ke la studgrupo efektive *ne* komencis je la nepra komencpunkto por iu tia studgrupo: identigi la diversajn lernsituaĵojn. Tion farinte, la studgrupo tiam, kaj nur tiam, diskutos la haveblajn kursmaterialojn, cele al, finfine, por ĉiu aparta lernsituaĵo doni aŭtoritatan aprobon al maksimume du, sed se eblas efektive nur unu, rekomendita, kurso.

La avantaĝoj de tiu esplormetodo estas memevidentaj: la unua listo, de apartaj lernsituaĵoj, povas esti ĝisdatigita se kaj kiam novaj lernsituaĵoj malkovriĝas; la dua listo, de rekomenditaj kursoj, povas esti same ĝisdatigita, sen la neceso por nova esploro pri la unua listo; manko(j) en la dua listo, pro lernsituaĵo por kiu neniam taŭga materialo estas konata aŭ trovebla, donas gvidon al verkontoj kiel plenigi la breĉo(j)n, kaj, laste, sed plej grave, la eldon-kvantoj de la diversaj (rekomenditaj) kursoj pligrandiĝos, ĉar vendoj de ne-rekomenditaj kursoj praktike ĉesos.

Mi ne estas membro de la studgrupo, sed ja estas membro de ILEI kaj mi deziras ludi mian rolon. Kiel mian kontribuon, do, mi proponas liston de lernsituaĵoj, kiun la studgrupo povas pristudi.

Kiel ajn oni akiras liston de lernsituaĵoj, la unua klara divido estas inter instruado al geinfanoj kaj al plenkreskuloj. Tria kategorio estas instruado al plenkreskuloj pere de perkoresponda kurso, kaj la kvara estas la situacio de hejm-studado, flanke de (verŝajne) plenkreskulo kiu jam sekvis iun kurson kaj do havas la bazan komprenon.

Pri geinfanoj, sekva klara divido estas inter:

- a klaso en lernejo sub instruado de profesia instruisto:
- a(i) dum lernejoj horoj kaj cele al ekzameno;
- a(ii) ekster lernejoj horoj kun volontuloj-lernantoj, kiam la celo, (flanke de la instruanto), estas kapti por Esperanto la lernantojn pro la ĝojo spertita dum la lernado. (Ne komprenu, tamen, ke lernantoj en situacio a(i) ne povas ĝui la studadon!);

Statut-projekto

- a(ii) ekster lernejoj kun volontuloj-lernantoj. kiam la celo, (flanke de la instruanto), estas kapti por Esperanto la lernantojn pro la ĝojo spertita dum la lernado. (Ne komprenu, tamen, ke lernantoj en situacio a(i) ne povas ĝui la studadon!);
 - b klaso en ne-lerneja situacio sub instruo de ne-profesia instruanto, ekzemple en societo de knabskoloj aŭ simile;
 - c klaso dum iu somerlerneja aranĝo, ekzemple en la Esperanto-Kulturdomo ĉe Grezijono;
 - ĉ samfamilianoj sub instruo de patro aŭ patrino.
- Pri plenkreskuloj, la situacioj povas esti tre diversaj. La klara divido estas inter:
- d vespera klaso de membro-kandidatoj de loka Esperanto-societo, kiam la lernantoj estas jam kaptitaj, (ĝis iu grado), pro intereso en la lingvo, kaj pro tio havas pli-malpli bonan motivon por akiri la lingvo-scion; la instruanto estas aŭ profesia aŭ ne-profesia instruisto, kvankam ĉi-foje tiu instruisto estas sensalajra volontulo;
 - e dum-taga klaso en universitato, kie la internacia lingvo estas rekonata kiel taŭga, elektebla 'moderna lingvo', kies akiro donas al la studantoj la rajton ne studi nacian lingvon. La studantoj, pro tio, havas pli-malpli bonan motivon por ĝin akiri; la instruanto estas ankoraŭ profesia lingvo-instruisto aŭ jam emeritita post profesiaj laboroj en la kampo;
 - f situacio simile kiel sub a(ii), sed en la kadro de universitato aŭ por-instruistoj-kolegio;
 - g hazarde kunmetita klaso en la kadro de kongreso aŭ alia plurtaga aranĝo, kiam la kursanoj havas jam iun bazan kapablon en la lingvo kaj estas bone motivitaj por akiri pli profundan scion;
 - h malgranda klaso de lernantoj je altgrada nivelo, kiel ekzemple en la Londona Esperanto-Klubo;
 - ĥ klaso de kompetentaj Esperantistoj, ne estante profesiaj instruistoj, kiuj deziras akiri kvazaŭ profesion kapablon instrui la lingvon, precipe al komencantoj;
 - i klaso de komizoj aŭ aliaj stabanoj de, ekzemple, la Eŭropa Parlamentejo, devigataj studi la lingvon pro ordono de superulo, kaj pro tio kun malmulte da propra volo aŭ eĉ kun negativa motivo.

Tre plaĉus al mi legi viajn komentojn, aŭ komentojn de aliaj legantoj, pri tiu ĉi, (ĉu nova?). metodo pripensi la kampon de instruado de Esperanto.

Kore salutas, sincere via,

Lawrence Mee

Kasisto de la Nederlando
Sekcio de ILEI.

Al la membroj de la estraro de ILEI
Al la membroj de la komisiono pri Statut-revizio,
Al la Sekcioj de Danlando kaj Svedio,

Kara geomikoj,

Mi tre ege dankas al vi pro viaj agrablaj kaj pozitivaj reagoj al la unua statutprojekto de mia plumo.

Preskaŭ mi certas ke ĉiuj viaj rimarkoj estas realigitaj en tiu ĉi dua klopodo. Se ne laŭ litero, tiam certe laŭsence viaj kontribuoj estas retroveblaj.

Al niaj Hispana amiko ni devas sciigi ke prokrasto de la pago de la kotizo estas neakceptebla. Plej malfrua dato estas la unua de februaro, tial ĉar en februaro devas aperi la unua ekzemplero de IPR.

Al niaj Svedaj geomikoj mi petas kompreni ke ne estas eble dum Komitata kunsido permesi al ĉiuj ĉeestantaj membroj partopreni en la diskutado. Tiukaze la kunsido certe devus daŭri unu monaton. Sed ja estas eble ke la ĉeestantaj membroj kontaktas siajn delegitojn en la paŭzo ktp. (Lobii?)

Tiam ĉiuj sekcioj povas amendi ĝin kaj en 1982-a ĝi estos la grava temo de Asembleo.

Sincere salutas via
Une Hukstra; Nederlando.

Reviziita projekto.

Statuto kaj Ĝenerala Regularo por I.L.E.I.

En ĉi tiu reviziita projekto mi klopodis enigi ĉiujn rimarkojn kiuj estas faritaj pri la unua projekto de novembro 1979-a.

Pritraktanta la unuan projekton kun la estraro de ILEI montriĝis ke kelkaj partoj pli bone trovi lokon en la regularo.

Tiu ĉi projekto kiel eble plej baldaŭ estos publikigita en I.P.R. kaj poste ĉiuj sekcioj havos okazon kritiki, amendi k.t.p.

Al S.rinoj Andersson kaj Dazzini mi petas kontroli lingvajn kaj tajpitajn erarojn kaj se eble tuj resendi la korektitaĵon.

Al ĉiuj kiuj sincere priatentis la unuan projekton; dankon.

junio 1980a
Oene Hoekstra

Identeco

Artikolo 1.

La organizaĵo estas nomita:
“Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj”
en la plua teksto de ĉi tiu Statuto kaj de la Ĝenerala Regularo nomita: “ILEI”.

Artikolo 2.

- 2.1 ILEI estas fondita en 1949-a por nelimigita tempo.
- 2.2 Antaŭe ILEI nomiĝis: “Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj”.
- 2.3 ILEI estas faka organizaĵo pri edukado kaj instruado.
- 2.4 ILEI estas aliĝinta al UNESKO en Kategorio C, aŭgusto 1977-a, listo CPX/77/10 S.7 numero 110.
- 2.5 ILEI havas sian juran sidejon en la Respubliko San Marino.
- 2.6 ILEI estas demokrata organizaĵo, sendependa kaj memstara en rilatoj al aliaj organizaĵoj kaj institucioj.
- 2.7 La bazo de la laborpolitiko de ILEI estas la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.
- 2.8 La oficiala lingvo de ILEI estas la Internacia Lingvo Esperanto.

Celo

Artikolo 3.

Edukado al estimo de la Homo kaj al Interkompreniĝo inter la popoloj.

Taksoj por atingi la celon

Artikolo 4.

- 4.1 Fondi kaj unuigi instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn.
- 4.2 Atenti, esplori kaj analizi la pedagogiajn problemojn en la instruado kaj edu-

- kado kaj labori por la solvo de tiuj problemoj.
- 4.3 Aranĝi kaj/aŭ subteni sciencajn esplorojn pri la instruado de fremdaj lingvoj.
- 4.4 Organizi interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por la plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado.
- 4.5 Organizi diversspecajn internaciajn aranĝojn por infanoj por ke ili apliku la Internacian Lingvon.
- 4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.
- 4.7 Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri la instruapablo en la Internacia Lingvo Esperanto.
- 4.8 Kontakti kaj kunlabori kun Esperanto-organizaĵoj, registaroj, edukaj instancoj kaj aliaj institucioj.
- 4.9 Eldoni publikigaĵojn kaj komunikaĵojn.
- 4.10 Apliki aliajn leĝe permesatajn rimedojn.

Financaj rimedoj

Artikolo 5.

- 5.1 Membrotizoj.
- 5.2 Kontribuoj de donacantoj.
- 5.3 Rentoj kaj heredaĵoj.
- 5.4 Aliaj enspezoj.

Membreco

Artikolo 6.

- 6.1 Ĉiu persono kiu rekonas la Statuton, sin okupas pri edukado kaj/aŭ instruado, povas membriĝi.
- 6.2 Membroj distingiĝas en “Sekciaj Membroj” (SM), “Individuaj Membroj” (IM) kaj “Honoraj Membroj” (HM).
- 6.3 Sekciaj Membroj estas are aliĝintaj al ILEI pere de la sekcioj.
- 6.4 Individuaj Membroj estas individue aliĝintaj al ILEI.
- 6.5 Honoraj Membroj estas nomitaj surbaze de siaj meritoj por ILEI aŭ por la instruado de Esperanto.

La organiza strukturo de ILEI

Artikolo 7.

- 7.1 La Asembleo.
- 7.2 La Komitato.
- 7.3 La Estraro.
- 7.4 La Sekcioj.

- 7.1.1 La Asembleo konsistas el la estraro kaj delegitoj de la membroj.
- 7.1.2 La Asembleo pridiskutas la laboron faritan de la Estraro kaj de la komitato kaj decidas pri sekvota gvidlinio por venonta periodo.
- 7.1.3 La Asembleo okazas minimume unu fojon dum tri jaroj en la kadro de konferenco de ILEI.
- 7.1.4 La Asembleo decidas pri akcepto aŭ ŝanĝo de la Statuto kaj pri la eventuala malfondo de ILEI.
- 7.1.5 Ĉiuj assembleanoj havas rajton pri diskuto, propono kaj voĉdono.
- 7.1.6 La kunsidoj de la Asembleo estas publikaj.
- 7.2.1 La Komitato konsistas el la sekcioj aŭ ties anstataŭantoj. Ili respondecas al siaj sekcioj.
- 7.2.2 La Komitato pridiskutas la laboron faritan de la estraro, la sekcioj kaj de la laborkomisionoj, ĝi decidas pri sekvota gvidlinio por la venonta jaro.
- 7.2.3 La Komitato elektas la membrojn de la estraro laŭ la regularo.
- 7.2.4 La Komitato povas starigi kaj nuligi Laborkomisionojn (LK).
- 7.2.5 La Komitato decidas pri senŝarĝo de la Estraro pri ties agoj dum la antaŭa jaro.
- 7.2.6 La Komitato kunsidas minimume unu fojon en la jaro.
La Kunsidoj estas alireblaj por ĉiuj membroj kaj invititoj.
- 7.2.7 La Komitato decidas en kazo de apelacio kontraŭ eksmembriĝo.
- 7.2.8 La Komitato decidas per simpla plimulto da donitaj validaj voĉoj.
- 7.3.1 La Estraro gvidas ILEI-on.
- 7.3.2 La Estraro faras proponojn pri agadlinioj kaj dezirataj aktivecoj al la komitato.
- 7.3.3 La Estraro raportas kaj respondecas pri siaj agoj al la Komitato.
- 7.3.4 La Estraro povas okazigi referendumon se en urĝaj aferoj necesas decido de la Komitato.
- 7.3.5 La Estraro konsistas el nepara nombro da membroj, minimume kvin. La prezidanto, la ĝenerala sekretario, la estrarano pri financoj, la vicprezidanto kaj la vicsekretario estas elektataj kiel funkciuloj. Pri eventualaj pliaj funkcioj la Estraro mem decidas.
- 7.3.6 La ofico daŭro de la estraranoj estas trijara.
Eksiĝantaj estraranoj estas tuj reelekteblaj.
- 7.3.7 La Estraro kunvenas laŭbezone.
- 7.4.1 La Sekcio de ILEI agas en difinita geografia teritorio.
- 7.4.2 La Sekcioj mem respondecas pri ĉiuj siaj agoj.
- 7.4.3 Sekcio povas esti fondata se estas minimume kvin membroj.
- 7.4.4 Pri akcepto de Sekcio decidas la Estraro.
- 7.4.5 Sekcio pagas la kotizon ĉiujare antaŭ la unuan de februaro.
- 7.4.6 Sekcioj geografie proksimaj povas kunlabori.

Taskoj de la prezidanto

Artikolo 8.

- 8.1 Kunvoki kaj prezidi la kunvenojn de la Estraro, la Komitato kaj la Asembleo.
- 8.2 Reprezenti ILEI en eksteraj rilatoj.
- 8.3 Entrepreni rilatojn kun aliaj instruistaj organizaĵoj.
- 8.4 Stimuli ĉiujn aktivecojn por atingi la celon de ILEI kaj la plenumon de la taskoj.
- 8.5 La Prezidanto havas la rajton sin anstataŭigi.

Taskoj de la ĝenerala sekretario

Artikolo 9.

- 9.1 Respondecu pri la organiza stato de ILEI.
- 9.2 Kontakti kun la sekcioj kaj la individuaj membroj.
- 9.3 Organizi la fondadon de sekcioj.
- 9.4 Kompili kaj prezenti la organizan jarraporton al la Komitato.

Taskoj de la estrarano pri financoj

Artikolo 10.

- 10.1 Zorge gardi la bonhavojn de ILEI.
- 10.2 Kolekti la kotizojn.
- 10.3 Kompili la financon jarraporton, prezenti ĝin al la Kontrola Komisiono kaj poste al la Komitato.
- 10.4 Kompili buĝeton por la venonta jaro kaj prezenti ĝin al la Komitato.

Taskoj de la vicprezidanto

Artikolo 11.

- 11.1 Aranĝi enketojn pri la stato de la instruado de Esperanto.
- 11.2 Prepari statistikojn pri lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.
- 11.3 Inter la kunsidoj prizorgi la kontaktojn kun la membroj de la Komitato kaj de la laborkomisionoj.
- 11.4 Asisti la prezidanton pri liaj taskoj.

Taskoj de la vicsekretario

Artikolo 12.

- 12.1 Okupi sin pri la varbado de novaj membroj.
- 12.2 Prizorgi la informadon eksteren kiel eble plej larĝskalan.

12.3 Prizorgi la regulan aperadon de la ILEI-publikigaĵojn.

12.4 Asisti la ĝeneralan sekretarion pri liaj taskoj.

Publikigaĵojn

Artikolo 13.

13.1 La oficiala organo de ILEI nomiĝas:

“Internacia Pedagogia Revuo IPR”.

13.2 IPR estas rekta kunligilo kun la membroj inter la konferencoj.

13.3 IPR aperas en la monatoj februaro, junio kaj oktobro.

13.4 La redaktoro de IPR estis nomata de la estraro.

13.5 Aliaj publikigaĵoj, raporto aŭ specialaj eldonoj de ILEI aperas kun la subtitolo: “Kajero de Internacia Pedagogia Revuo IPR”.

Fino de la membreco

Artikolo 14.

Eksembrigo okazas:

14.1 Per sciigo de la sekcio.

14.2 Per sciigo de la membro.

14.3 Pro forpaso de la membro.

14.4 La sciigoj devas okazi, minimume tri monatojn antaŭ la fino de la jaro, per registrita letero al la ĝenerala sekretario.

Ekmembrigo okazas pro:

14.5 Dujara nepagado de la kotizo aŭ kontraŭ-statuta agado.

14.6 La Estraro decidas pri ekmembrigo kaj sciigas pri tio per registrita letero al la sekcio aŭ membro.

14.7 Kontraŭ la decido de la Estraro eblas apelacii ĉe la prezidanto de la Komitato, maksimume unu monaton post ricevo de la sub 14.6 celita letero. La prezidanto priraktos la leteron en la venonta kunsido de la Komitato.

Ĝis la decido de la Komitato la membreco restas netuŝita.

Ĝenerala regularo

Artikolo 15.

15.1 Al tiu ĉi Statuto apartenas Ĝenerala Regularo kiu havas la saman validon kiel tiu ĉi Statuto.

Ĝenerala regularo

Artikolo 1. Difinoj.

1.1 Tiu ĉi regularo havas la saman validon kiel la Statuto.

1.2 En tiu ĉi regularo estas uzataj la mallongigoj kiel en la Statuto.

1.3 Pri akcepto kaj/aŭ ŝanĝo de tiu ĉi regularo decidas la Asembleo laŭ la sama proceduro kiu validas por la Statuto.

Artikolo 2. Pri financaj rimedoj. (Statuto art. 5.)

2.1 La kotizon SM pagas laŭ la sekcia statuto aŭ regularo.

2.2 La kotizon IM pagas ĉiujare antaŭ la unuan de februaro al la estrarano pri financoj. Li fiksas la sumon de kotizo por ĉiuj landoj en nacia valuto.

2.3 La kotizon fiksas la Komitato.

Artikolo 3. Pri membreco (Statuto art. 6)

3.1 Ĉiuj membroj havas la rajton ĉeesti la konferencojn de ILEI.

3.2 Ĉiuj membroj ricevas la oficialan organon IPR.

3.3 Surbaze de artikolo 6.5 de la Statuto, la Asembleo povas aparte distingi membrojn de ILEI per la titolo “Honora Membro”.

3.4 HM povas esti proponata de la Komitato, la Estraro, Sekcio aŭ de minimume kvin membroj de la Asembleo.

3.5 La propono kaj pravigaj aldonoj estu direktitaj al la Asembleo pere de la prezidanto, minimume ses monatojn antaŭ la malfermo de la Asembleo.

Artikolo 4. Pri Laborkomisionoj (LK) (Statuto art. 7.2.4)

4.1 LK konsistas el minimume tri membroj el kiuj unu komitatano.

4.2 LK raportas al la estraro laŭ interkonsentita regulo.

4.3 LK havas difinitan taskon kaj labortempon.

Pri voĉdono (Statuto art. 7.2.8)

4.4 En kazo de stagno de la voĉoj la Komitato decidas kiam ĝi denove voĉdonos. En kazo de dua stagno la koncerna afero estis ne-akceptita.

Artikolo 5. Pri la estrarelekto. (Statuto art. 7.2.3)

5.1 La proceduro de la elekto aŭ reelekto de la estraro estas jena: La membroj de la estraro estas unuope elektitaj aŭ reelektitaj unu foje dum tri jaroj.

5.2 La balotado okazas dum Asembleo en speciala kunsido de la Komitato.

5.3 La balotado okazas per skriba aŭ parola voĉdono.

5.4 La rajton pri kandidatigo havas; la estraro, la komitatanoj kaj minimume kvin asembleanoj.

5.5 En kazo de intertempa ekzigito de estrarano, la prezidanto respondecas pri daŭrigo de la laboro.

Artikolo 6. Pri la Sekcioj. (Statuto art. 7.4)

- 6.1 La Sekcio sciigu al la ĝenerala sekretario en kiu geografia teritorio ĝi agas. Ne necesas ke la teritorio egalas al ŝtato.
- 6.2 Sekcio nomas unu membron kiu prizorgas la kontakton kun la Estraro. Tiu membro estas nomita "Sekciestro" SE.
- 6.3 Sekcio nomas konstantan reprezentanton ĉe la landa UNESKO-komisiono.
- 6.4 Sekcio sendu siajn publikaĵojn ankaŭ al la estraro kaj redaktoro de IPR.
- 6.5 Ricevitaj raportoj, protokoloj kaj bultenoj de la Estraro estu senprokraste komunikitaj al la membroj.
- 6.6 La SE respondecas pri la akurata pago de la kotizo.
- 6.7 La SE prizorgu la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj en la teritorio. La enketa dato estas la unuan de novembro. La statistiko estu sendita antaŭ la unuan de februaro al la koncerna estrarano.
- 6.8 La SE sendu ĝis la unuan de junio laborraporton pri la pasint jaro al la ĝenerala sekretario.

Artikolo 7. Pri la Asembleo (Statuto art. 7.1)

Pri la konsisto de la Asembleo.

- 7.1 Sekcio nomas delegitojn laŭ la ĉisuba tabelo;
ekde 5 membroj unu delegito,
de 6 ĝis 15 membroj du delegitoj,
de 16 ĝis 45 membroj tri delegitoj,
por ĉiu plia 45 aŭ parto de 45 unu plia delegito.
- 7.2 La bazo por fiksi la nombron de delegitoj estas la pagita kotizo por antaŭa jaro..
- 7.3 La Asembleo decidas per simpla plimulto de la validaj donitaj voĉoj.
- 7.4 Pri akcepto aŭ ŝanĝo de la Statuto, la Ĝenerala Regularo kaj pri eventuala malfondo de ILEI, la Asembleo decidas se minimume du trionoj de la validaj voĉoj estas favoraj al la propono.
- 7.5 En kazo de malfondo la Asembleo nomas komisionon kiu;
likvidas la kurantajn aferojn de ILEI;
indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia organizaĵo, kiun indikas la decido pri malfondo.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo:	Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo:	Ernst Rixner Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belgujo:	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes. Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Brazilo:	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE 9 8HH.
Britujo:	Hristo Gorov, B.E.A., Hristo Botev 97, Sofio Centro.
Bulgarujo:	Lis Thune, Bremsbävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Danujo:	Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Finnujo:	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
Francujo:	Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-315 Peine.
F R Germanujo:	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Grekujo:	Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hispanujo:	Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.
Hungarujo:	M. Saghafian, Siras Ave, Emdadi str. 22, Vanak, Teheran 19.
Irano:	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavík.
Islando:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Israelo:	Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Italujo:	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Japanujo:	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2. IV. 32, YU-11000 Beograd.
Jugoslavujo:	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 60179, Medellin.
Kolombujo:	Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Luksemburgo:	Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.
Malto:	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
Nederlando:	John Lewine, West Stockbridge, MA 01266, Usono.
Nordameriko:	Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.
Norvegujo:	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
Nov-Zelando:	Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.
Polujo:	Marina Michelotti via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.
Sanmarino:	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
Sovetujo:	Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-340047 Doneck.
Sud-Afriko:	Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
Svisujo:	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz.
Venezuelo:	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hrimedice Okr. Pribram.
Ĉinujo:	Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D R:	Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Jemena PDR:	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Malagasujo:	Eugene Raveloson, B.P. 127, Antananarivo.
Singapuro:	Hongi Liao, apt blk. 14,2809 H, Eunios Crescent, Singapuro 14.
Zairujo:	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu.

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F R Germanujo.
Viceprezidanto: direktoro Johano Inguzs, Liget út 40, H-1102, Budapest X, Hungarujo.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa, Italujo.
Vicesekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Olle Olsson, Bantorget 2, S-22229 Lund, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Arsenalstraat 5, B-2000 Antwerpen.
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj — ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Elmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150, FRG
poŝtĝirkonto: Stockholm, 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono: 30 svedaj kronoj

Instruisto, kiu abonas la revuon, fariĝas membro de ILEI.
Familianoj kaj simpatiantoj pagas la duonon, 15 svedajn kronojn, ne ricevas la revuon sed iĝas membroj de ILEI en la koncernaj kategorioj.

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI aŭ al la supre indikita poŝtĝirkonto.